## ANTAŬPAROLO DE LA AŬTORO.

I

En somerbril' ni glitas kvar :
  Du fuŝe uzas remon,
Fuŝregas tria knabinet'
  Boatan la vagemon.
La kvara (nejunulo) celas
  Indulgi la revemon.

II

" Kruela Tri' ! Ĉu volas vi
  En tia hor'— rakonton ?
Se pri la astmo scius vi,
  Vi eble sentus honton !"
— Protesto senutila ! Venkas
  Trivoĉa kri', " Rakonton !"

III

*Unua* per komanda voĉo
  Ordonas ekrakonti,
Kaj pli ĝentile *Dua* petas
  "Jes, nepre *mir*-rakonti."
Rakonton petolrompas *Tria*
  Ne scias *ŝi* ja honti !)